

Ĉineske

(XIII)

e-Librigita de Elerno

junio 2010

Busuanzi (Aŭguristo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de
55,75 silaboj kun duona rimo.

Cezar (Germanujo)

Maljustas la Ter'

**Dikulo manĝas
malpli ol sveltul'!
Ne helpas la dieto
sen gras' laŭ postul'.**

**Sveltulo manĝas
multon sen kontrol'.
Justeco ne ekzistas.
Ne helpas la vol'.**

**Dikulon mokas
la svelta homar'
eĉ kun laŭta ridado
kaj jaron post jar'.**

**Sveltulo mortas
pro fia kancer',
sed dikuloj plu vivas.
Maljustas la Ter'.**

Cindy Mckee (Usono)

Mi portus pluvon

**Se mi nur povus
mi portus pluvon
al via trosekeco-
renversus kuvon.**

**Sed mi ne povas
sendi diluvon.
Miaj malplenaj manoj
oferas pruvon.**

**Amiko mia,
la koro plenas,
sed manoj kaj ĉielo
ambaŭ malplenas.**

**Mi levas manojn
kaj Dion ĝenas,
ke li portu la pluvon.
Nu, mi amenas.**

Eto

Soifa je akvo

sekeca monstro

**ĉerpas el infer’
akvon en kampoj, putoj
kaj longa river’**

**ĝi jen turmentas
homojn en desper’
jen pelas brutojn for de
akvoriĉa sfer’**

**tero fendiĝas
senakvas la lag’
plantaĵoj mortas tute
frenezas la plag’**

**ĉi’ en okuloj
videblas en svag’
homoj, brutoj soifas
en nokto kaj tag’**

**veter’ komplikas
per senpluva lud’
dum kelke da monatoj
en la ĉina sud’**

**ni vere preĝas
pri gracia altrud’
pri plifrua ĉesigo
de la monstra krud’**

*En marto de 2010 okazas trosekeco en sudokcidenta parto de Ĉinio, senigante pli ol 20 milionojn da homoj je trinkakvo.

Se mi estus Zeŭso

**al plagita lok'
mi kun volonto
disverŝus savan pluvon
el ĉiel-fonto**

**ĉar mi estus reĝ'
de Olimp-monto
mi ne lasus popolon
en disaponto**

Vejdo

Novaj vestoj de l' reĝo

**Antaŭ tre longe
vivis reĝ' kun am'
granda al belaj vestoj
kaj la vanta fam'.**

**Li ne prizorgis
ŝtataferojn jam
sed ĉiam okupiĝis
pri vesta ornam'.**

**Nu, du trompantoj
kiel tajloroj
venis al lia urbo
kun mava koro.**

**Ili afektis
jen por laboro
tajlora serĉi ĉie
nun kun fervoro.**

**Ili eĉ blagis
ke ili povas
eltekxi belan ŝtofon
kiun ne trovas**

**oni en la mond',
ke ili provas
desegni belajn kolorojn
kaj eĉ elŝovas**

**ŝtofon plej belan
kun mirinda ec'.
La vestoj faritaj el
ĉi tiu ŝtofpec'**

**nur videblas por
tiuj kun saĝec'
kaj tiuj kun okuloj**

taŭgaj por aprec’.

**La reĝo pensis,
“Kia mirplena
vestaĵ’ĉi tio estas!
Sen forto pena**

**surportante ĝin
en kort’ solena
mi distingas saĝulon
de ul’ azena.”**

**Kun granda ĝojo
la reĝo vanta
ilin akceptis urĝe
sen movo lanta.**

**Li ja esperis
ke elegantaj
vestoj tuj elfariĝu
je kost’ giganta.**

**Li antaŭpagis
grandan monsumon
por ke ili komencu
tuj teksu umon**

laŭdire belan

**sorĉan kostumon
kaj donis al ili jam
nun oportunon.**

**Du trompantoj
starigis vere
teksilojn por labori
ja sinofere.**

**Super teksiloj
do enaere
ili faradis movojn
ŝajne sincere.**

**Ankaŭ kalkulis
ili en la kor'
por postuli de l' reĝo
aĵojn de valor'.**

**Li malavare
per silko kaj or'
kontentigis ilin du
ŝajne en labor'.**

**La valoraĵojn
ili enmetis
en siajn proprajn poŝojn
kaj plu ripetis**

**la artifikon
kaj ludon duetis.
Por pli da valoraĵoj
ili jam pretis.**

**Iutage lin frapis
scivola ide',
ĉu malrapidas teksad'
aŭ rapidas tre.**

**Do li ministron
oldan kun obe'
sendis al laborejo
de vestaĵo-kre'.**

**L' oldul' alfrontis
provon rigore.
Li kovis kaj timon kaj
dubon enkore.**

**Li sciis bone:
se laŭsplore
li ne vidis la ŝtofon,
li malfavore**

**tenos l' oficon,
ĉar pruviĝos li**

**sentaŭga, malsaĝa laŭ
reĝa opini’.**

**Spite al tio
li sen emoci’
iris al du trompantoj
de nigra magi’.**

**Ĉe teksiloj lin
kaptis paraliz’
“Mia Dio,” li en si
diris kun surpriz’,**

**“nenio estas!
Ĉu l’ vido en mis’?”
Lia juĝado vere
troviĝis en kriz’.**

**Trompantoj al li
laŭdis per gesto:
“Kiel bele aspektas
ŝtofo por vesto!”**

**La maljunulo
ja kun honesto
vere vidis nenion
jam en ekzisto.**

**Li ne kuraĝis
diri la veron,
sed ekludis nevole
falsan operon.**

**Li jese eĥis
nun je espero
ilia kaj esprimis
sian preferon.**

**“Kiel superba
la hela kolor’
kaj desegnaĵ’ de ŝtofo!
Ververa trezor!”**

**Li kompreneble
ne esti malglor’
kiu oni lin prenis
—malsaĝa sinjor’.**

**Ĉe reĝ’ raportis
li kontraŭvole
ke iras glate teksad’
ol buŝ-parole.**

**Tio plaĉigis
la reĝon fole,
li kredis: l’ oldulo ne**

flatas kajŝole.

**Nun du trompantoj
postulis plue
pli da or' de l' reĝo por
riĉiĝi ĝue.**

**Ili laboris
senkontribue
sur malplenaj teksiloj
kaj kontinue.**

**Sen pacienc'
la reĝ' ekspedis
alian oficiston
ĉar lin obsedis**

**progres' de teksad'.
Li nur posedis
novajn vestojn, sed ŝtaton
volonte cedis.**

**La misiito
samon atenti
ĝuste kiel ministro
kaj li lamentis**

enkore vee.

**Al li prezentis
nenion du trompantoj
sed elokventis,**

**“Ĉu belas ŝtofo?”
La misiito
trovis sin en dilemo.
Sen ajn ekscito**

**murmure jesis
li kun hezito,
ĉar li vidis nenion
dum la vizito.**

**Li timis esti
la idioto
en alies okuloj
kaj la mokoto**

**sur ties lipoj.
Al la komploto
li cedis perfideme
kiel bigoto.**

**Ĉe reĝ' mensogis
li per rava vort'
laŭdis la ŝtofon verve
en sia raport'.**

**Ĉe tio l' reĝo
ĝojis kun komfort',
ĉar lia deziro tuj
venos sen abort'.**

**Nun ĉiuj homoj
en la reĝlando
zumis pri novaj vestoj
kun diamanto.**

**Oni sopiris
kun granda vanto
al reĝa vest-parado
de eleganto.**

**Nun volis la reĝ'
vidi persone
ĉu teksado de ŝtofo
procedas bone.**

**Kun sekvantaro
la reĝ' impone
iris al la teksejo
kiel ciklone.**

**Du trompantoj
laboris pene**

sur malplenaj teksiloj
teksis senĝene.

Kia surprizo!
la reĝ' ĉagrene
vidis nenion vere
neniom plene.

La du teksistoj
ostentis ruze,
“Kiel rava ĝi estas!”
La reĝ' konfuze

ekpensis en si,
“Ĉu 'stas amuze
se mi diros la veron
jen senakuze?”

“Ĉu mi ne taŭgas
la reĝo esti?
Veras l' ŝtofo teksita
ja ne ekzisti!

Sed mi ne devas
tiel honesti
kaj resti silentema
por ne kontesti,

**alie oni
certe prenos min
kiel malsaĝan reĝon.”
Li kun korinklin’**

**fari laŭdadon
diris sen fin’,
“Rave! Bele! Tre bone!
En granda fascin’!”**

**Post kelkaj tagoj
pretiĝis fine
la novaj vestoj por reĝ’.
Jam halucine**

**tiu en menso
ekpentris ŝpine
la fajnajn vestojn freŝajn
jam elmaŝine.**

**Kun longa vico
da sekvantaro
li sekvutage iris al
trompanta paro.**

**Ili permane
sen ajn eraro
levis vestaĵojn geste**

jam en preparo.

**“Jen pantalono,
jen la mantelo,
jen balaspekta surtut’.
Kia modelo!**

**Ili malpezas
kun gaza belo
kvazaŭ araneaĵo
en luma helo.**

**Oni do povus
pensi image,
ke oni portas korpe
nulon dumtage.**

**Tio ja estas
fakte sengage
ilia plej grava ec’
klara malsvage.”**

**“Jes,” ĉiuj eĥis,
kvankam ne vidis
ion ajn ili fakte.
La du rapidis**

urĝi la reĝon

**kaj lin jam gvidis
surporti novajn vestojn
kiuj jen sidis**

**verŝajne bone
sur korpo lia.
“Kiel bele aspektas
la reĝ’ en tia**

**vestaĵo nova!”
En ton’ malpia
du ruzuloj flatis per
parol’ fikcia.**

**Post kelka tempo
ekis parado.
Solene l’ reĝo marŝis
sur ĉefa strato.**

**Ĉiuj ĉe vojo
ĉe balustrado
en fenestroj hurais
per laŭd-kaskado:**

**“Kiel superbaj,
ho, mia ĉiel’,
la novaj vestoj estas!”
En ĝoja pelmel’**

**oni kriegis
kun voĉa anhel'
ĉar ili esperis ke
ili per fidel'**

**volas atesti
saĝecon sian.
Oni jen volis trompi
koron senscian.**

**La reĝ' dankegis
laŭdon onian
per mansvingo kaj faris
ridon radian.**

**Infan' subite
kriis akute,
"Li surpotas nenion,
ja nuda tute!"**

**Infan' senkulpa
tiuminute
diris veron al la mond'
ja senbalbute**

adaptita el la samtitola fabelo de Andersen

Viktoro

Senkompata Ĉiel'

dum longa tempdaŭr'
neniu pluvgut'
sur fendiĝantan teron
falas per elŝut'

senakvas river'
sekiĝas la put'
homoj, brutoj soifas
en ĉiu minut'

palaj vizaĝoj
kaj lipoj tremaj
bezonas akvan duŝon
pro brulo prema

homoj indignas
kun sent' blasfema
ve, senkompata ĉiel'
foriru kriĝema

ne daŭros plago
kun senbrida ĝen'
nur portempas sufero
kaj sekeca scen'

**homoj kuraĝe
batalu kun pen'
por liberigi nin de
vetera katen'**

Vivsava pluvo

**suferas longe
pro sekec' la ter'
homoj ankaŭ sopiras
al pluv' kun esper'**

**plantoj kaj brutoj
vivas en danĝer'
trenas vegetadon en
sufoka mizer'**

**feliĉe pluvo
falas leĝere
la vivsava pluvakvo
nutras kulere**

**vivo revenas!
ne plu mizere
ni veas en senhelpec'
nek plu sufere**

Caisangzi

(Moruskolektanta Knabino)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de
74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa, a,a. (x=senrima)

Cezar (Germanujo)

Vojaĝgrevoj

**Kiel poŝtmark' sur kovert'
en hotelo
ĉe botelo
ekrevas tuj pri velo,**

**tiel logas min kun fort'
fora relo,
rajda selo,
flugado en ĉielo.**

Eto

Rendevuo

**nin ĝojigas inspire
nur rendevu'
sub nokta blu'
fore de urba hombru'**

**nin ekzaltas senlime
brakuma ĝu'
kvera elflu'
mildaj kisoj inter du**

Niuniu

Poŝtmarko

**kiel nuber' sur ĉiel'
kunletere
kaj libere
veturas kuriere**

**tamen oni ne scias
kien vere
ĝi espere
volas celi prefere**



Chaozhongcuo

(Pedanta Klerulo)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj
respektive de 7,5,66 / 444,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa
/ xxa,xa (x=senrima).

Eto

Espera verdo

**etendiĝas verd' de mont'
ĝis la horizont'
refreŝiga vidaĵ'
por okula renkont'**

**ĝi prezentas
vivipovon
de esper-font'
ĝi promesas venon
de fruktodona ont'**



Daolianzi

(Kanto de Lavantino)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ
rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Eeeeeee

**Vestitaj
e-voste;
svingante la e poste
miaj vortoj aktivas.
Adverbis mi ĝisoste.**

**Kritikoj
inflame
instigas min tamtame.
Ĉio sonas impone
kaj vi protestas lame.**

**Abele
zumzume
vestitaj e-kostume
Ili laboras por mi
esp-e-lingve-parfume.**

Eto

Feliĉo

**feliĉo
la kaĉo
'stas post longa vojaĝo
kiam vi hejmeniras
preta laŭ via plaĉo**

**feliĉo
rideto
kuraĝiga en preto
estas sur karula vang'
je via fala veto**

**feliĉo
glas' da te'
estas tuj apud vi se
vi dronas en ĉagreno
pro aflikta la pase'**

**feliĉo
la floro
estas en pompa gloro
kiam onni gratulas
vin je sukcesa horo**

feliĉo
'stas l' ombrel'
malfermita en veter'
pluva kiam vi iras
sur kota strato sen cel'

feliĉo
la kaban'
hejtita en neĝa ban'
kiam vi elĉerpiĝas
pro ĝen' de vintra satan'

feliĉo
la sento
'stas kun ĝoja torento
kiam vian fraŭlinon
post longtempa atendo

Viktoro

Blinda Masaĝisto

masaĝas
sen vido
li zorge kun memfido
knedo, froto kaj bato
iras en malrapido

ĉu tuja

**efiko?
jes, doloro kun piko
en mia brak' mildiĝas
pro kuraca apliko**

**saluton
mi al li
donu pro lia pasi'
al zorgema laboro
kaj memvivtena konsci'**



Dianjiangchun

(Ruĝigitaj Lipoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj
respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj, laŭ rimaranĝo
xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)

Ardo

Kiam revenu?

**ĉe fenestro
sidas milda virino
kun fascino
ama abstino**

**Kontinue
flosas pluvo kun spleno
Kie vi?
hirta sceno
sola reveno**

Cezar (Germanujo)

Malĝentila vizitanto

**En mia urb'
min vizitis hom', kreten',
vir' sen kompren'**

pri mia pen'.

**La liriko
estis por li splen',
iluzi'.
Kia azen',
tute sen seren'!**

Li Qingzhao (1084-1155)

En Buduar'

**en buduar'
mi solecas kun ĉagren'
kaj bedaŭr-ĝen'
pri printempa sven'**

**ĉe balustrad'
mi sopiras jen
kien li?
baras herb-scen'
vojon de reven'
elĉinigi Vejdo**

Dielianhua

(Papilio Super Floroj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
7,45,7,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,a (x=senrima)

Cezar (Germanujo)

Kajtoj

Flugas kajtoj sur la mar',
buntaj, multaj',
en konkursa far'.
Kajtofest' en ĉiu jar'
kaj kun granda kajtbazar'.

Flugas kajtoj sur la mar',
rektanguloj,
drakoj kaj Ikar'.
Jen eĉ ran' kaj kalendar',
kia ĝojo sen kompar'!

Cindy Mckee (Usono)

Foje, kajto

Foje, kajto sur ĉiel'
longfadene.
Kiel vosta stel'.

Foje, tiro ĉe spindel'
ŝnuras min al ternivel'.

Fadenlongo sur parcel'
flugrifuze.

Landlima model'.

Tro malfrue, via ĉel',
mi jam fojis sur ĉiel'.

Eto

Kajto

flugas alten sur ĉiel'
kajt' papera
supren ĉe ventŝvel'
kaj malsupren en ventpel'
kie estas ĝia cel'?

ĝi kun koro de ribel'
baraktadas
el tira kruel'
de la fadena fidel'
ve, ĝin lulas nur ŝancel'

Dingfengbo

(Subigo de Ŝtormo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj
respektive de 7,7;7,2;7;/7,2;7;7,2;7; silaboj, laŭ rimarĝo
aabba/ccdeed

Cindy Mckee (Usono)

Forfikulo

**Ĉielrado ruliĝas
jaroj akumuligigas
polvo- kaj sangopezaj—
spezaj
varoj kiuj nuliĝas.**

**Spekulacie ventas.
Sentas
kio? Krom ni? Ĉu Iu
sentas pezon de rento—
vento
en la poŝon de Kiu?**

**Ĉielrado ruliĝas
ni brutoj forbruliĝas.
Do, mi pasas malflue—
brue.**

Ĉi varo makuliĝas.

**Do, brulu sur mi, disko—
risko
jam estis nuligita.
Sumo de mi valute—
brute
estis postuligita.**

Eto

Bondeziron al Patrino

**mi plenkreskis el la sin'
de sindonema patrin'
venas fort' de viaj mam'
kaj am'
vasta mare ja sen lim'**

**mi bondeziras al vi
kun pi'
dum la Patrina Festo:
vivu ĝoj-akompane
sane
glate en vivtempesto**

Viktoro

Hajloŝtormo

**pelate de uragan’
hajloj kiel en duŝban’
disverŝiĝas vuale
fale
sur la teron kun rikan’**

**frapado al terdomoj
homoj
kaŭzis damaĝon grandan
ĉu vipis natur’ per pun’
en nun’
homrondon arogantan?**



Fendieer (Papilio)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 10,34,334,36 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xxa,xa (x=senrima)

Viktoro

Kaptita papilio

papilio kaptiĝis per reto

vundita

sak-almeto

limigas

ĝian movon

en kvieto

ĝi nure

kaŭras en retreto

por liber' ĝi ekas per sinĵeto

barakti

kun impeto

sed vane

kvankam per

ag-ripeto

ĝin regas

mizera vegeto

Fengrusong

(Vento Inter Pinoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj
respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ
rimaranĝo a,a,xxa,xa /a,a,xa,xa (x=senrima)

Vejdo

Al Cezar

okaze de lia naskiĝtago, 2010

**grandan dankon, kara Cez’
jen pro l’ interes’
pri ĉineskaj poemoj
ho, vere
vi kun aprez’
legas kaj eĉ kreas
kelkdekon kun sukces’**

**per energia elspez’
klopodu sen ĉes’
por esperanta parnas’
kaj la ĉineska progres’
por tuta legantar’
ni verku sen forges’**

Guizhixiang

(Aroma Laŭrbranĉo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 4,
54, 64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo
a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xxa (x=senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Per malfermita okulo

**En ĉi horo
guto da ŝvito
post amoro.
Muŝo proksimiĝas
pro odoro.
En taŭzitaĵ littukoj,
lasita
sola floro.
Sen movado,
sen pensado,
sen sinjoro.**

**Sur fenestro, vapore
en disaj bildoj,
en aŭroro.
Tra fenestro, viro,
poŝesploro.**

**Ŝlosilo kaptas sunon
kaj turnon
de motoro.
Muŝflugiloj
vibras ritme
kun sonoro.**

Lily

Jasmena bonodor’

**la bonodor’
jasmena restas
en mia kor’
de kiam ŝi kaj mi
ja en amor’
diboĉis sub la arbo
ŝi logis
sen ajn pudor’
min per arom’
de parfumo
al ĝua bor’**

**alkroĉiĝas al memor’
ŝajne eterne
feliĉa l’ hor’
ĉu en sufero aŭ
kun bonhumor’
mi ekflaras aromon**

**çiam de
jasmena flor'
mi aspiras
al pasia
geiça or'**



Haoshijin

(Proksimiĝas Bona Afero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de
56,65 / 75,65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x =
senrima)

Niuniu

Mi revenas

**nun mi revenas
ne nur pro la sopir'
al la karuloj
sed pro la dezir'**

**por renkontiĝi kun ŝi
sed pro la altir'
de hejmloka ŝanĝo
plenplena je mir'**

**nun mi revenas
el la lando fora
kun varma aspiro
kaj sent' elkora**

**por komenci aferon
la buntkoloran**

**de nuna momento
kun fort' fervora**

Viktoro

Perdita pejzaĝo

**akvo ne puras
ne bluas la ĉiel'
arboj malaperas
kien tia bel'**

**homoj ĉion venenas
por la propra cel'
pejzaĝo perdiĝas
pro homa kruel'**



Hexinlang

(Gratulo al Novedzo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj
respektive de 5,344,76,7,78,33 / 7,344,76,34,78,33
silaboj, laŭ rimaranĝo a,xxa,xa,a,xa,xa / a, xxa, xa, xa,
xa,xa (x=senrima)

Niuniu

Nupto sur herbejo

la ceremoni'
jen ekas
sur la herbej'
en ovaci'
nova paro aperas
en milda melodi'
enmarŝas kun ridradi'
brak-en-brake lantpaŝe
riverencas al ni kun pi'
tuj sonas
laŭta kri'

ringojn ŝanĝas li kaj ŝi
brakumas
kaj lipkisas
jen kun pasi'

**faras voton kaj ĵuron
antaŭ la famili'
sincere
kun emoci'
boge patroj respondas
per bondeziroj en seri'
“vivu en
harmonii'!”**



Huanxisha

(Silk-lava Rojo)

ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po tri versoj de
sep silaboj laŭ rimarangô aaa / xaa (x=senrima)

Cezar (Germanujo)

Ŝia elekto

**Li atendas jam dum hor'
la amatan kun fervor',
tute plenas de ador'.**

**Sed ŝi kuŝas jam ĉe vir'
pro avido pri amor'
por gedorm' sen tro da kor'.**

Cindy Mckee (Usono)

La neforlasanto

**Li restis kaj atendis.
Aliaj nur pretendis,
lasis aŭ ŝin forsendis.**

**En ŝia florigardeno
Fidelon li defendis,
li restis kaj atendis.**

Viktoro

Vana atendo

mi atendas kun ĉagren'
en obsura florĝarden'
ŝin ankoraŭ en festen'

horoj pasas forflue
neniam ŝia reven'
okazas ĝis frumaten'



Jiangnanchun

(Printempo Sude de Rivero)

ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Viktoro

Senhejma infano

dediĉe al infanoj en venta katastrofo

**mi iras
sencele
en sensuna strat'
vento ribele
blovas penetrante ĝis
miaj ostoj kruise**

**mi iras
timeme
sen ĝusta pripens'
frosto subpreme
pezas sur mia korpo
senkompate ekstreme**

**kie mi
iru al?
mia hejmo jam**

**foriĝis en fal’
pro venta diboĉado
en mortiga festival’**



Langtaosha

(Ondo Lavas Sablojn)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
5,4,7,74 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa (x=senrima)

Cezar (Germanujo)

Fi-miraĝ'

Se mankas la saĝ',
vera engaĝ'
por granda vivovojaĝ',
perdiĝas ĉiu vojo
en fi-miraĝ'.

Sur homa vizaĝ',
pala en kaĝ',
ekperdiĝas la sovaĝ'.
Restas jam nur disciplin',
aŭt' en garaĝ'.

Niunio

Reveno al juneco

kun granda kuraĝ'
malgraŭ grandaĝ'
veturis per marvojaĝ'

**ŝi sen alies helpo
el doma kaĝ’**

**ŝi volis per saĝ’
en la pejzaĝ’
naturbela de sovaĝ’
sperti vivon plenan je
juna mesaĝ’**



Litingyan

(Hirundo ĉe Kiosko)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 66, 76,
56 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Vejdo

Noel—laborema abel'

okaze de lia naskiĝtago (2010)

**li en florĝardeno
laborema abel'
kolektas polenon por
produkto de miel'
flugas senlace
nia kara Noel**

**li fosas kaj fosas
la sulkon kun fidel'
en nia Esperantuj'
kun ĝojo de fabel'
ade tradukas
senhalte sen ŝancel'**

**Noel Lecomte estas aktiva esperantisto el Francio. Li,
kun penego, tradukadas el franca literaturo.*

Manjiangong

(Rivero Plenruĝa)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 11 versoj de
434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ
rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x =
senrima)

Vejdo

Sindonema veterano

okaze de la 88-a naskiĝtago de Li Sen*

**Kun verda glor’
de esper’
kara Li Sen
jam staras
en profundaĝ’.
Kun granda pen’
li fosas nian sulkon
en esperanta ĝarden’
silente
sindoneme kaj
kun elten’.**

**Prezentu
ni kun ben’
deziron**

**de varmplen’
al li sincere.
Ĉe la solen’
naskiĝtaga ni tostu
por lia vivo sen ĝen’
por verda
la promesplena
entrepren’!**

**Li Sen: ĉina esperantista veterano, kiu sindoneme sin dediĉas al ĉina E-movado dum la tuta vivo. Li faris grandan kontribuon al E-Movado de Interna Mongolio de Ĉinio.*



Moyuer (Fiŝado)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 12 versoj de
346, 76, 3, 37, 4, 545 / 36, 6, 76, 3, 37, 4, 545 silaboj,
laŭ rimaranĝo xxa,xa,a,xa,a,xxa / xa,a,xa,a,xa,a,xxa
(x=snrima)

Cindy Mckee (Usono)

Aprilo, mezo de la vejno

**Angio
kondukas nin
sidante sur ĉelo,
en cirkulada ciklo
al la pulsa stelo.
De kelo
de vintro,
ĉi parto de tunelo
ŝajnas ŝvelo
de vivperceptoj.
La mezpunkto
al kora celo.**

**Aprilo,
varmiĝanta pelo
sur rapida relo.
Ni, feliĉe senscia,
kredas je ĉielo.**

**Rivelo
ŝokiĝus
Jen tera karuselo-
ĉel-nivelo
en granda korpo.
Ni, en sango
rajdas tra belo.**

Vejdo

Aprilo

**aprilo
gaze falas
kviete leĝere
kun ruĝo, verdo, flavo
birdoj enaere
fiere
pepadas
pri reviviĝ' libere
sendanĝere
viv' videblas jam
moviĝante
june surtere**

**aprilo
alvenas mistere
en koron pretere
geamantoj en rendvu'**

**korverŝas sincere
am-kvere
sub arboj
ŝajne Kupid' prefere
memofere
la gejunulojn
en ĉi tempo
ligas espere**



Nangezi (Suda Kanto)

ĉina fiksforma poemo el 4 versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

Cezar (Germanujo)

La morta knabino

**Sur morta mano
flirtas papili',
kadavron vidas sub si.
Knabino morta, ne fantazi'.**

**Polico venis,
la komisar'
rigardas, sed kun amar'.
Li serĉis ŝin dum streĉiga jar'.**

**La papilio
flugas kun bel',
for de l' vir' al nova cel',
leviĝas vikle al la ĉiel'.**

**Ĝoja ĝi estas,
por li eĉ fascin'.
En pensoj li vidas ŝin.
Ŝi estis gaja kaj belulin'.**

Viktoro

Surpriza atako de frosto

floroj persikaj
jen en sunradi'
ekflirtas kun papili'
kvazaŭ per natura poezi'

neatendite
l' okulplaĉa scen'
malaperis jam en sven'
pro surpriza frostflua alven'

petaloj kuŝas
triste sur la ter'
frido regas en aer'
nur staras kalva arb' en mizer'



Copyright by www.Tadpole.com

Pozhenzi

(Kavalira Danco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de
66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x = senrima)

Cezar (Germanujo)

Papago amas porkinon

**La papago vokas
laŭte al la porkin'.
Jen ĝia karulino!
Manĝon ĵetas ĝi sen fin',
ĉar ĝi amas ĝin.**

**Dankas la porkino
laŭte eĉ per gruntad'.
Pro amo de l' papago.
Kia riĉa bona plad'
de la kamarad'!**

laŭ sceno en la B.Traven-romano "Rozo Blanka" (el ĉapitro 1/6)

Cindy Mckee (Usono)

Grunt, grunt

**Ni du rozaj porkoj-
lingvo nomiĝas Grunt'.
Bon-etiko nomiĝas-
um, sulkiĝas porka frunt'...
La Truplena Punt'!**

**Ni metas morojn, jes!
Malsukcesas la munt'. :(
Ni nur frotas nin kune
kiam kotas nia bunt'
kaj gruntas por prunt'.**

Dormetu, kara

**Patrino dormetas
kuŝante en faroj,
pro, por kaj pri famili';
detruoj kaj riparoj,
kelkaj eraroj.**

**Patrino dormetas
kuŝante en jaroj.
Idaj generacioj,
Ŝiaj ag-inventaroj,
sidoj kaj staroj.**

Vejdo

Patrino en majo

okaze de Patrino Tago 2010

**patrino en majo
laboras kun obstin'
per profunda sentiment'
tra multaj jaroj sen fin'
kaj kultivas nin**

**patrino en majo
surportas per la spin'
grandajn devon kaj ŝarĝon
kontraŭ mizera destin'
kiel rekta pin'**

**patrino en majo
renkontas per toler'
la palan perspektivon
plena je fida esper'
super barier'**

**patrino en majo
penas kun vola fer'
vivteni l' familion
kontraŭ embuska danĝer'
sen ajna desper'**

**patrino en majo
plenumas kun promes'
dumvive la vivcelon
strebante kun sinforjes'
por nia neces'**

**patrino en majo
flegas ame sen çes'
vundojn niajn en la kor'
por vidi nin en progres'
en brila sukces'**

Viktoro

Soleco de folio

**nura folio sur
arbo tremas en vent'
kun du aŭ tri rosgutoj
kvazaŭ plorus kun lament'
pri la trista sent'**

**jam malaperis rond'
verda kun viv-prezent'
nur çagren' kaj soleco
vipadas ĝin per turment'
en frosta moment'**

Qinyuanchun (Printempo en la Ĝardeno Qin)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 13 versoj de
444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ
rimaranĝo xxa,xxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxxa,xxa,xxa (x =
senrima)


Niuniu

Paseo

**maldormulo
konfuzita
kun tristmien'
profunde en pens'
sin dronigas:
pro kio li
penis kun ĝen'
ŝin plaĉigi?
pro kio li
sin donis en frumaten'
kui
manĝon nur por ŝi
je ŝia ven'?**

**sed destin' per festen'
ne portis**

**je lia çagren’
beatan šancon
ši hezitis
evitis pro
duba diven’
ne voluntis
aliri al
lia soifa kapkusen’
çu tion
kaŭzis ververe
ama venen’?**



Qingpingyue

(Serena Muziko)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 4,5,7,7 / 6,6,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,a / a,a,xa (x = senrima)

Mandio

Mia poemo

**mia poem’
mia pensa krem’
ĝi ja servas kiel sem’
de mia idea tem’**

**kiam estas en dilem’
mi kun dolora ĝem’
la poem’ min savas
el fuŝpensa ekstrem’**



Qingyu'an (Verdjada Taso)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po sep versoj de
7,33,7,445 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,xxa (x=senrima)

Mandio

Pento

**en mia viv' malplena
forpasis
ĉagrena
tempo en fluo svena
mi pentas pri
nenifarad'
kaj lud' senĝena**

**sed mi sentas min splena
jam nune
alvena
memriproĉado ĉena
min vipadas
jen pro mia
faro azena**

Renyueyuan (Rondiĝo de Luno kaj Homoj)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj de 5 kaj 6 versoj
respektive de 75,444 / 444,444 silaboj, laŭ rimaranĝo
xa,xxa / xxa,xxa (x=senrima)

Cezar (Germanujo)

LUNO SURBRANĈA

**Jen sur branĉo sidas Lun'
laŭŝajne sen cel',
ripozema
kaj pozama,
kun granda bel'.**

**Luno plena
apud arbo,
kun blanka hel'.
Ni ĝin vidas
kun plezuro
en noktĉiel'.**

Viktoro

Silentema knabino

staras vi sur alta mont'

**en sunluma bril'
silentema
enpensema
kaj en trankvil'**

**kvazaŭ lotus'
treme skuas
en ventfacil'
kvazaŭ fluas
roj' sensone
sur ter-stabil'**



Rumengling (Kvazaŭsonge)

ĉina fiksforna poemo el 7 versoj de 6,6,56,2,2,6 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xa,a,a,a. La kvina kaj sesa versoj estas samaj.

Li Qingzhao (1085-1155)

Nokt-pluvis en seri'

Nokt-pluvis en seri',
restas post dorm' ebri'.
Eĥis servistin':
"Samas la begoni'."
"Sen sci',
sen sci'.
Grasas verd' ol ruĝ' pli!"

elĉinigis Vejdo



Santaici (Tri Terasoj)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de ses silaboj kun krucrimo.

Cindy Mckee (Usono)

Koratako

**Floroj en la korto,
nubfloroj aere.
Malvarmiga vento
portas ŝin pretere.**

**Rokmuziko, ŝercoj,
la skribita vorto,
etuloj kvin kaj du,
floroj en la korto.**

**Malvarmiga vento
puŝas kontraŭ haŭto.
Insista silento,
plej terura laŭto.**

**Supre floras nuboj
kreskante pli kaj pli.
Vento en la korto
inter la famili'.**

**Mia panjo naskis 5 filojn, du filinojn. Mi estas la sesa
el la sep. Ŝi estas en hospitalo, koro..ĉiufoje, la novaĵo
pli malbonas...mi volis skribi sentojn.
Mi aldonis komon, alie estus kvin etuloj kaj du floroj.*

Mandio

Estu firma, Yushu

**subita tertremo
vin atakis, Yushu
domoj falis tute
ĉio vibris en sku'**

**dummomenta mutio
regis la terparton
kvazaŭ nigra monstro
ĵonglis magi-arton**

**tibetajn gefratojn
suferigis plago
vora kaj tertrema
en aprila tago**

**ĝi rabis homvivojn
falĉis ĉion spite
kaŭzis du mil mortojn
eksteratendite**

**ĉe la kriza tempo
alvenis savforto
alvenis monhelpo
por mizera sorto**

**tra la tuta lando
ondas kora sento
por niaj gefratoj
sub sama tegmento**

**estu firma, Yushu
ĉiuj staras ĉe vi
por luktadi kune
kontraŭ monstra magi'**

Viktoro

Restigi nubon

**mi volas restigi
nubpecon en floso
por ornami korton
sen flora etoso**

**tamen ĝi silentas
kontraŭ mia peto
kvankam mi promesas
voton per ripeto**

**volas mi flugigi
belan kajton al ĝi
por promeson mian
realigi kun pi'**

**ĝi ignoras tute
kontraŭ kor-sincero
mia esprimita
fide per espero**

**oh, nubpeco blanka
flosu kun sopiro
mia al fraŭlino
fora en pens-iro**



Shanhuazi (Monta Floro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de
7,7,73 / 77,73 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa / xa,xa (x=
senrima)

Mandio

Malforta homaro

**ŝprucas l' islanda vulkan'
kun polvo en akompan'
nigras ĉielon kiel
huligan'**

**homoj time refuĝas
antaŭ la lafa fontan'
homoj senhelpas kiel
suĉinfan'**



Shaonianyou

(Vojaĝo en Juneco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
7,5,445 /75,445 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xxa / xa,xxa
(x= senrima)

Viktoro

Ekskurso en ĉirkaŭurbo

en printempa sunradi'
kun laŭta ĝojkri'
ni ekskursas
ĉirkaŭurben
por freŝa medi'

verdaj plantoj kaj montoj
birda melodi'
pura aer'—
ĉio restas
sen ajn poluci'



Shengshengman

(Lanta Sontreniô)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10 versoj
respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36,46,634,37 silaboj,
laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xa (x =
senrima)

Lily

Barbara edzo

I.

edz' barbara
mia tenas
sin jam plenprepara
ĉe geiĝa horo
li bizara
ligas miajn manojn
piedojn
per lin-hara
vipeto
skurĝbatas
mian pubon karan

per la jaguara
langego

lekas malavara
mian nudon
ĝis la sub' senbara
suĉas miajn cicojn
per movo
multefara
ja vere
kun fervoro malŝpara

II.

mi kun ĝemkri'
baraktadas
kun tiklema konsci'
sub forta atak' de
impuls-seri'
je ĉiu lia lek'
reagas
per konvulsi'
vagina
kun suko
fluetanta en stri'

kiam en agoni'
mi fole
krias en litani'
de fik-petad'
li ŝovas kun pasi'

ĝin kaj piŝtas ĝoje
plenforte
ja kun mani'
kvazaŭe
dronante en vin-ebri'

Li Qingzhao (1084-1155)

Serĉas en svag'

Serĉas en svag'
mi solece
kun fridiga imag'.
En ekvarmiĝa temp'
oftas frost-hak'.
Vinglutoj ne povas
rezisti
al vent-atak'.
Gruaflug'
ĉagrenas
min pri korsenta pag'.

Ĉie floroj en stak'
velkintaj,
jam mankas florpluk-ag'.
En izolo
mi tranoktos en vak'.
Pluv' platanon vipas
vespere

kun guta klak’.
Jam nune
trist’ kulminas sen forvag’.

elċinigiš Vejdo



Shengzhazi

(Monta Kratago)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po kvar versoj de 55,55 silaboj, laŭrimaranĝo xa,xa (x=senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Eĥo

**Brako streĉtiras
ondo sonoras
tra frida vento
trem' aprioras.**

**Ĉu sonorilo
ĉu eĥo foras
ne vere gravas;
nur vent' memoras.**

**Tuŝu la haŭton
sono de kapel'
vi estas ondo
de Makiavel'.**

**Ĉu matureco
ĉu homa ribel'**

ne vere gravas;
gravas neniel.

Cezar (Germanujo)

La fantomo

I

En mia kapel'
mi migras ĉe l' ĉerk',
memoras pri l' viv'
pri versoj, pri l' verk'.

Mi vivis kun pen',
Mi estis stultul'
sen iu sistem',
laŭ hom' sur insul'.

II

Mi iĝis fantom'
post viv' kun cerbum'.
Sed kial ja mi?
Pro vivo sen lum'?

Groteskas la sort'.
Pro kio la pun'?
Mi migras sen vort'
en noktoj sen sun'

Lily

Vane

mizere edzo
eltiras per kac'
sin el vagino
mia jen pro lac'

li anhelante
frotas kun grimac'
ĝin foje-foje
sur ŝrika matrac'

li impotentia
povra malfortul'
vanigas flamon
de mia ambrul'

tion bezonas
mi sub seks-stimul'
sed ĉio iras
rezulte al nul'

ve, vane vane
je mia desper'
li ĉiam molas
sen ajna prosper'

**tagon post tago
vipas min sufer'
sed kion fari?
daŭre kun toler'**

Geiĝo kun fantomo

**sonĝo prezentas
bildon kun fantom'
aliranta al
mia eta dom'**

**li eniras kun
alloga arom'
gestas geiĝon
per longa kondom'**

**mi do kuŝiĝas
sur mola lito
frivole vokas
per dolĉ-invito**

**li min korp-kovras
jen kun ekscito
kaj pretas ludi
sen ajn hezito**

he, vere strange

**nenian pezon
mi eksentas nek
karnan kareson**

**li kisadas min
por intereson
mian elvoki
kaj mian jeson**

**mi palpas suben
por kaco lia
sed krom aero
umo nenia**

**ja li manovras
kun sent' pasia
mordetas varme
en voĉo kria**

**mi ja konscias
pri lia enir'
kvazaŭ li agas
kun granda aspir'**

**ĝi kirlas ene
per en-kaj-eltir'
ha, interese
kiel viva vir'**

**torde diboças
li jen leĝere
kiel venteto
blovas libere**

**lian komplezon
mi volas vere
tamen li jame
svenas mistere**

Viktoro

Sopiro

**en nokta mallum’
pliiĝas sopir’
pri mia hejmo
en friska zefir’**

**nune ĉu miaj
edzin’ kaj solfil’
vivas plezure
aŭ kun vesuspir’?**

**min premas sopir’
kun korŝira ĝen’
des pli pezpeze
ĉe nokta alven’**

**mi konfuzite
ĉagreniĝas jen
tute maldormas
ĝis la frumaten’**



Shiliuziling

(Dekses-Silabo)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj,
laŭ rimarangô a,a,xa (x=senrima)

Anteo

Sentitole

**for
de anime fora for'
la foro
estas vera for'**

Ardo

Sentitole

I

**mevo
trupe flugas kun revo
trans nuboj
Ja sen ricevo!**

II

**febr"
en geedzigxa celebr'
sed eble
ne pro korpa febl'**

Cezar (Germanujo)

Uro

Ur'
iris, spiris kun plezur',
tre fortis
ĝi laŭ la statur'.

Ur'
trotis, ĉasis eĉ dum kur'.
Perdiĝis
tamen ĝia spur'.

Cindy Mckee (Usono)

Art'

Art'
pliboniga homa start'
flegartas
por tera bonfart'.

Eto

Tur' sur monto

sur
monto staras pinta tur'
solece

en venta tortur’

tur’

al la ĉiela lazur’

lamentas

“ve al altstatur’!”

Sopiro de patrino

en

hejmlok’ patrin’ kun ĉagren’

sopiras

al fila reven’

larm’

ŝia fluetas en svarm’

survange

en gutoj de varm’

fil’

ŝia kilometrojn mil

defore

oftas en babil’

jam

ŝi fariĝis olda dam’

ankoraŭ

kun patrino am’

lin
bezonas kun korinklin'
ŝi nune
sopire sen fin'

kun
grizaj haroj de maljun'
ŝi vivas
solece en nun'

ve
ŝin sopirema ide'
turmentas
jen ĝis apoge'

ĉu
la filo vivas kun ĝu'
scias pri
ŝia mens-vaku'

Kvantumo (Italujo)

Natur'

Nur
tia natura natur'
nature
fariĝas natur'.

Lily

Somera impulso

vol'
aspira el sanga bol'
fermentas
je ĉela petol'

varm'
somera kun ama ĉarm'
instigas
onin al seks-svarm'

fik'
de facilfara praktik'
videblas
en kampa piknik'

bor'
okazas eĉ ĉe labor'
dum paŭza
kaj ripoza hor'

ge-
iĝ' pli oftas sen pane'
nure je
impulsa ide'

**mond’
homa pro amora ond’
somere
viglas kun volont’**

Mandio

En somera pluvo

**stri’
pluva kvazaŭ en ebri’
rakontas
pri maja pasi’**

**fal’
pluva per gaza vual’
lavas per
bana festival’**

**en
pluvo sencela promen’
freŝigas
la menson sen ĝen’**

**kun
bonhumor’ mi ĝuas nun
kvazaŭe
en softa brakum’**

Milokula Kato

Sentitole

Nur
tia matura matur'
mature
fariĝas matur'.

Nur
tia faktura faktur'
fakture
fariĝas faktur'.

Siv Burell (Svedujo)

Sentitole

cert' :
verkas vi kun granda spert'
troviĝas
ĉinpoeta lert'

Vejdo

Somera allogo

bel'
natura sub blu-ĉiel'
allogas

pleje en somer'

verd'

senlima per kovra perd'

ornamas

la teron kun cert'

flav'

flora puras post pluv-lav'

abelojn

altiras al rav'

vent'

friska el la firmament'

kareasas

per tiklema sent'

spir'

juna pufas en zefir'

vigligas

per ama inspir'

vid'

la scivola kun timid'

ĵetiĝas

sub belina gvid'

am'

ardas nun en juna flam'
aeron
plenplenigas jam

Viktoro

Vi estas mia stel'

stel'
estas vi sur la ciel'
flagretas
en mia korĉel'

nur
min gajigas per plezur'
vi kara
stel' kun kora pur'

en
nokt' mi rigardas sen ĝen'
kapleve
al vi en lumplen'

mi
vin bondeziras kun pi'
eterne
vivi kun pasi'

ĉu

**vi scias ke en enu’
sopiras
mi vin kun sentflu’**



Shuidiaogetou

(Preludo de Akva Melodio)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj
respektive de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55 silaboj laŭ
rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa / xxa, xa, xxa, xa (x =
senrima)


Sam

Jakto sur lago

**jakto sur lago
kun motora bru'
flugas kiel sago
stabile sen sku'
ĝi giras laŭronde
trenante saŭmstrion
blankan sur akv-blu'
la ondoj ŝprucas
ĝis bord-avenu'**

**en sunlum'
la paro
ja kun ĝu'
sur ĝi sidas
babilante plu kaj plu
ili kisas ŝmace**

**brakumas sin ame
sen ajna enu'
ha, eviinda
jakta rendevu'**



Shuilongyin (Akva Drako)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 12 versoj de
67,444,444,5433 / 6,34,444,444,544 silaboj, laŭ
rimaranĝo xa,xxa,xxa,xxxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x=
senrima)

Sero

Diluvo el firmamento

**diluvo torentas
el la griza firmament'
ĝi balaas
glute voras
per akra dent'
la herbejon
la vilaĝon
kun hurla vent'
faligas domojn
grandajn arbojn
dum eta
la moment'**

**fronte al pluvtorent'
senhelpo
sen ajn atent'
homoj veas
homoj ploras**

**jen kun lament'
ĉu homforto
povas venki
kun kompetent'
tute triumfe
super mava
la element'**

verkita okaze de granda diluvo en ĉinaj 13 provincoj en
la jaro 2010



Sumuzhe

(Virina Ĉapo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 7 versoj de 33,
45, 7,45 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a,xa (x= senrima)

Eto

Sopiro

**molestas
la sopir'
kaj ankaŭ ĝi
kiel la zefir'
feliĉigas kun altir'
ĝi ja estas
duklinga rapir'**

**penetras
per disŝir'
ĝi en ĉelojn
vekas per dezir'
aŭ vipas vin kun suspir'
ja konfuzas
per nigra drapir'**

Suzhongqing (Kora Sento)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj
respektive de 7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimarango
a,,a,xa / xa,,a,xxa (x=senrima)

Mandio

Mia amo perdiĝis

**estingiĝis arda flam’
de pasia am’
en mia korfundo
ŝi forlasis jam**

**mi flosas
kiel pram’
sen dinam’
en akv-kirlo
disrompiĝos
ĉe fina dram’**

Tasuoxing (Paŝo sur Herbo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
44,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa,a,xa (x=senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Fluga ludo de birdidoj

—Saluton, kluk'!
—Kvivit! al vi!
—Ni ludu esti avi';
en tiu herbejo, jen.
Unue mi, tiam vi.

—Mi falas, ŭa!
—Kaj mi, hihi.
Lanuga anatomi'.
Ni paŝu sur la herbo
ĝis plumoj kreskos sur ni.

Eto

Tigo kaj foli'

Kun fierac'
bela foli'
mocas turpan tigon pri
ties malbelaj korpo
kaj kolor' per ironi'.

**Per rebato
tig' sen envi'
diras, "Vi mortus sen mi.
Vi min devus danki pro
mia subtena funkci'!"**

Niuniu

Naturo

**fluas rojo
jen en murmur'
birdoj kantas kun plezur'
cent floroj kluke ridas
en petola ventvetur'**

**ĉu eĉ nehomoj
de la natur'
ankaŭ vete en konkur'
korverŝas reciproke
babilante en susur'?**

Tianjingsha (Pura Sablo)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 6,6,6,4,6 silaboj kun kontinua rimo

Sam

Sur plaĝo

**mi fiksrigardas ŝin
kun stupora fascin'
ĉar en bela bikin'
ŝi sen abstin'
ĉarme allogas min**

Viktoro

Gaja rivero

**fluas gaja river'
ridete kun leĝer'
kantante en fier'
kaj en liber'
ĝojplena sen mizer'**

Tiaoxiaoling (Flirta Kanto)

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

Eto

Pluvo

**en vent', en vent'
falas pluv' en silent'
fiaskas bivako
sub akva atako
kota, kota
en irado trota**

Rekuniĝo

**larma, larma
en brakumo varma
kun rida vizaĝo
post longa vojaĝo
ĝoja, ĝoja
rekuniĝ' ĉifoja**

Lily

Memkonsolo

**konsol', konsol'
en senvirina sol'
pro sensuka povro
per mana manovro
provo, provo
laŭ seksa bontrovo**

**ĉuro, ĉuro
ŝprucas laŭ plezuro
pro erot' alvena
jen diboĉ' senĝena
naĝe, naĝe
geiĝi-miraĝe**



Wanghaichao

(Rigardo al Martajdo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de
446, 446,5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj, laŭ
rimaranĝo xxa, xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x =
senrima)

Viktoro

Funebrado ĉe l' marbordo

okaze de tutlanda funebrado (la 21-an de aprilo,
2010)

**furmatene
ĉe marbordo
svaga mia pensstri'
ondas kiel
mara akvo
sub ora sunradi'
kvazaŭ per magi'
de parnasa muz'
deziras mi
verki versojn
por suferintoj kun pi'**

**ilin tute sen sci'
la tertrema plag'**

**per murd-mani’
brute falĉis
aŭ subpremis
ili en agoni’
per voĉa vari’
vokis ĝisraŭke
la elegi’
sonis trae
en funebr-ceremoni’**

** La tertrema tragedio okazis en Yushu gubernio en Qinghai provinco en la nordokcidenta Ĉinio. Ĉirkaŭ 2 mil homoj mortis kaj pli ol dek mil homoj vundiĝis. La 21-an de aprilo, la tuta lando de Ĉinio funebris pri la viktimoj en la katastrofo.*



Xiangjianhuan

(Ĝojo de Intervidiĝo)


ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun tri kaj kvar versoj respektive de 6,3,9 / 3,3; 3,9 silaboj laŭ rimaranĝo
aaa / bb,aa

Sero

Disiĝo

**pro ŝiaj malfidel’
kaj kruel’
mi foriris sen ajna ŝancel’**

**veture
senspure
al la cel’
de mia dua gea miel’**



Xijiangyue (Luno super Okcidenta Rivero)

ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de
66,7,6 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

Mandio

Mi atendas vin

mi atendas karan
fraŭlinon, vin en for'
alkroĉiĝas mia kor'
al vi de hor' al hor'

viaj diligento
mildeco kaj fervor'
restadas kiel trezor'
jam en mia memor'



Yanermei (Ĉarma Okulumo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
7,5, 444 / 75,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa / xa,xxa
(x=senrima)

Viktoro

Knabino kun grandaj okuloj

**ĉarmas ŝia okulpar’
en puro kaj klar’
ili restas
jen en mia
memora mar’**

**mi ĉiame prisonĝas
ilin sen erar’
kun akva bril’
ili belas
ja sen kompar’**



Yexingchuan

(Nokta Ŝipvojaĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 6 versoj de
7,34,446 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xxa (x = senrima)

Viktoro

Lunarko

**lunarko kiel boat'
glimbrilas
super urbstrat'
ŝi malsupren
pririgardas
per observema gvat'**

**sidas par' kun senta ŝat'
sub arbo
jen en rilat'
la intima
kveras dolĉe
en sekreta privat'**

Yijianmei

(Branço da Umefloro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 6 versoj de
7,44,744 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xxa (x = senrima)

Sero

Sub la ombrelo

en pluvo sub la ombrel'
ni kuniĝis
en spir-anhel'
kisas en varma brakum'
ni kveradis
per vort-miel'

bedaŭrinde la ĉiel'
ekserenis
iris sun' el
nubaro kaj ni diris
adiaŭ al
ombrel-fabel'

Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)

ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj
laŭ rimarangô xa,xa,a (x=senrima).

Viktoro

Floro en pluvo

**petaloj
falas altere
jen kun miaj larmgutoj
aromo malapere
svenis mizere**

**en pluvo
mi enaere
elflaris bonodoron
vian ĉirkaŭ mi vere
ĝoje prefere**

**forgesi
mi ne pretere
povas vian profilon
kiam buntas prospere
vi kaj espere**

Yiwangsun (Rememoro pri Princido)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 7,7,7,3,7 kun
kontinua rimo.

Sero

Hundo atakas

enstrate vagas hundo
lame pro krura vundo
kun hat' en korprofundo
mord-rundo
ekas je ĉi-sekundo



Yujixing

(Promeno sur Palaca Strato)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po ok versoj de
7,33,76,445 silaboj, laŭ rimarango a,xa,xa,xxa (x=
senrima)

Sam

Cementa vojo

**mi iras nudpiede
sur la voj'
obsede
de cementa pavimo
kamptero jam cede
subpremiĝis
de kreta blok'
ĉie komplete**

**ĉu oni planas prete
okupi
procede
tutan vivtenan teron
per cemento trete
ĝis elĉerpiĝ'
de vivspaco
jen surplanede**

Yulinling (Tintado en Pluvo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj
respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35,634,426,345 silaboj,
laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x =
senrima)

Cindy Mckee (Usono)

Sola

**Tertremo for
jam delonge.
Longa esplor'
kolektis infanojn
al persisto
de provizor'.
La sola certeco,
deposta ignor'
en tendoj
jam sukure
starigitaj en pulvor'.**

**Knabo fuĝis el pulvor'
ĝis grundo
ŝajnis el marmor'.
Nokte li revenas,
kolektas
el urba kor'**

**brikon, ŝtonon,
panon!—
jen, la plej granda or'.
Scias li,
ke sub urbo
estas nur vapor'.**

Vejdo

Espero de infano

okaze de Infana Festo 2010

**povra infan'
vagas strate
ofte sen pan'
li toleras batojn
kaj insultojn
de strat-tiran'
gepatrojn li perdis
jam en uragan'
pereis
ankaŭ lia
karmemora la kaban'**

**esperon kun granda am'
li nutras
per larma fontan'
li ne volas esti
leĝera**

**strat-huligan’
li sopiras
kore
al hejmeca balzam’
li volas
krei domon
per la propria man’**



Zuihuajian

(Ebrio inter Floroj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 4 versoj
respektive de 3,3,5,5,5 / 5,5,5,5 silaboj, laŭ rimaranĝo
a,a,a,xa / a,a,xa (x=senrima)

Sero

Abelo

la abel'
en sunhel'
inter flora bel'
suĉas nektaron
por onta miel'

al konstanta cel'
agas sen ŝancel'
ĝi diligente
kun grupa fidel'

Zuihuayin (Ebrio sub ombro de floroj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
7,5,545 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa (x=senrima)

Cezar (Germanuo)

La ĉarrado

**Rado pendas en la kort',
jarojn jam laŭ sort'.
Ne plu ruliĝas
en iu ĉar'
kun ĉaristeskort'.**

**Iu skribis en raport':
"Endas la deport."
Tempo kruelas,
jen kiel verm'
jen per fajromort'.**

Sam

Tempo

**Kiam elĉerpiĝas mi,
lacas ankaŭ ĝi.
Ĉion kunhavas**

**ni: espero,
amo, emoci'...**

**Ni kune per energi'
vivas en soci'
de naskiĝa hor'
finfine ĝis
morta agoni'.**

